## Gefiono

Kiam la insulo Selando (Själland) ankoraŭ ne ekzistis,la ĉefdio Odino sendis Gefionon orienten por havigi pli da tero al Danio.Tiu diino de la virgulinoj venis al Svedio,kies reĝo Gylfe trovis sin tiel rava,ke post kelktempa amorad li promesis al ŝi tiom da tero,kiom ŝi povos elplugi dum unu tago.

Por havigi tirbestojn taŭgajn por tiu laboro Gefiono iris al iu jotuno (grandegulo),kiu gravediĝis ŝin.Naŭ monatojn poste la diino naskis kvar filoj Ilin ŝi ŝanĝis en gigantajn virbovojn kaj jungis antaŭ la plugilon.
Per siaj enormaj fortoj la filoj tiris kaj tiradis.La plugilo tranĉis tre profunde.Finiĝis la longa tago.La elplugitan teron la virbovoj tiris okcident kie Gefiono lokis ĝin inter Fueno (Fyn) kaj Skania (Skåne).En Svedio restis responda truo:la lago Vänern.Jen la estiĝo de Selando,laŭ la mitologio.

## La bors-konstruaĵo

La bors-konstruaĵo estas vidinda domo,kiu situas proksime al Knippelsbro sur la insuleto Slotsholmen(la kastelinsuleto).Kristian la IV-a konstruigis la bo son dum la jaroj 1619 ĝis 1622.La arkitektoj nomiĝis Lorenz kaj Hans Steenwin du fratoj.Poste oni konstruis la drako-pinton kun la kvar drakoj,kies vostoj formas la pinton (Ludvig Heideritter desegnis ĝin).Ankaŭ la tegment-etaĝoj ka la orienta fronto konstruiĝis en 1640.La brikoj estis unue flavaj kun ruĝaj strioj,sed komence de la dudeka jarcento oni anstataŭigis la flavajn brikojn per ruĝaj,kaj la originalaj figuroj de sabloŝtono per kopioj.
Komence la teretaĝo estis magazenoj.Ŝipoj povis transporti la varojn rekte al la pordegoj tiutempe.En la supra etaĝo estis butikoj.Ek de la jaro 1681 okazis kunvenoj de komercistoj,kaj ek de la jaro 1857 funkcias la konstruaĵo kiel bo Saman jaron aĉetis la merkat-societo la domon.Nun la bors-aferoj okazas alialoke - ek de aŭtuno 1974.

## Trinitato (Triuno)Preĝejo

La preĝejo Trinitato estas konstruigita de Kristiano la IV.Ĉefe altiras nian atentonĝia Ronda Turo,34 m.alta.De la strato al la supro kondukas ne ŝtuparo sed spiralforma vojo (209 m.).En 1717 la rusa caro Petro la Granda(1689-1725) gastis ĉe la dana reĝo Frederiko la IV-a (1691-1730) kaj tiam faris viziton i.a al la Ronda Turo.Carino Katarina supreniris per kariolo tirata de ses ĉevaloj. Caro Petro sekvis sian edzinon sur propra besto.La neordinara rajdado tiel pla al la suvereno de Rusio,ke li ĝin ripetis du fojojn.

Dum pluraj jarcentoj la Ronda Turo servis kiel astronomia observatorio por la Kopenhaga Universitato.Nun amatoraj stelamikoj en klaraj vesperoj per bona teleskopo montras al la publiko surĉielajn interesaĵojn.

De la alta supro oni havas belan vidon al la multaj kopenhagaj turoj.

Iun nokton en 1943 la toraoj de la danaj judoj estis sekrete transportitaj e la proksima Sinagogo en la kripton de Trinitato kaj kaŝitaj inter la sarkofago malantaŭ falsa muro.Eĉ hodiaŭ oni ne scias,kiu(j) prizorgis tion.La sanktaj skribrulaĵoj reaperis post la liberiĝo en majo 1945. Ekde tiam ekzistas tute specialaj konfidencaj rilatoj inter la juda sinagogo kaj la dana preĝejo Trini

Tiu estis kaj estas distrikta preĝejo,sed longatempe ĝi krome servis kiel studenta preĝejo.La granda universitata biblioteko en la subtegmentejo perdiĝi dum terura incendio en 1728;je tiu katastrofo 40 % de la urbo forbrulis.

Dum la 1980-jaroj iom neordinara grupo da personoj komencis ariĝi ĉirkaŭ Trinitato:enmigrintaj kristanaj ĉinoj kaj parencoj de Ĉinio-misiistoj.Ĉiun dua semajnon okazas alta meso en la fora azia lingvo.

## Preĝejo de Nia Sinjorino

En jaro 1807 britaj trupoj komencis 3-noktan bombardadon al la ĉefurbo (tiutempe 100.000 enloĝantoj).Plej dense loĝata estis la distrikto kun Nia Sin rino ĉefpregejo,al kies 125 m.alta spajro (turpinto) la malamiko celis multajn raketojn kaj bombojn.En la tria nokto brulsago trafis la pinton de la spajro. Rapide ĝi fandis la kupron kaj ekbruligis la lignan internon.Frumatene la spaj falis kaj grandparte detruis la preĝejon.Je la falo trabo funkciigis la sonori laron.En la terura nokto aŭdigis la melodio de mortoĥimno.La britoj ĵetis sur Kopenhagon 14.000 bombojn.Post la rapida kapitulaco la malamiko forkondukis ĉiujn danajn militŝipojn escepte de unu jaĥto,kiujn kelkajn jarojn antaŭe la brita reĝo donacis al sia "kara kuzo la dana kronprinco".Tiu resendis ĝin al Britio kun afabla saluto:"Pro la hasto vi forgesis jenan ŝipon en Kopenhago

Ĝis 1814 regis milita stato inter Britio Kaj Danio.Je la paciĝo post la falo de Napoleono ni perdis ankaŭ Norvegion al Svedio.En 1813 la dana ŝtato bankrot Je la posta rekonstruo Nia Sinjorino ne ricevis novan spajron.

# Absalon

En la jaro 1902 starigis kopenhaga komunumo statuon pri la urba kreinto: la episkopo Absalon.Bone ili elektis tiun lokon,ĉar Absalon alte sidanta sur sia ĉevalo povas rigardi rekte al Slotsholmen,kie li konstruigis la unuan kastelon de Kopenhago.

Absalon estis unu el plej rimarkindaj kaj elstaraj personoj,kiu naskiĝis en Danio.Li apartenis al mezselanda potenca nobela familio.Tiu havis granda influon en la 12-a jarcento,ne nur al la reĝa potenco sed ankaŭ al la eklez

Iun tagon en la jaro 1128 Absalon kaj lia ĝemelfrato vidis la tagan lumon en la urbeto Fjenneslev apud Sorö.En la bapto la knaboj ricevis la nomojn Axel kaj Esbern,sed en sia matura vivo la nomo Axel estis anstataŭita per la pia nomo Absalon kaj per tiu li iĝis famekonata.

De kiam Valdemar la Granda iĝis reĝo en 1157 devenas la scio pri Absalon. Li estis intima amiko de Valdemar kaj kaŭze de tio donis Valdemar al li episkopan postenon en Roskilde. Absalon bone kaj sincere apogis Valdemar en lia reĝperiodo ne nur per sia saĝeco kaj kuraĝo,sed ankaŭ kiel ĉefpolitikisto de Danio.Lia scio estis eminenta kaj pro ĝi li plurfoje venkis la batalojn kontraŭ la malamikoj:la Vendoj.

En la jaro 1167 konstruigis Absalon la unuan kastelon de Kopenhago.Ĝi ne estis luksa kiel la postaj kasteloj.Ĝi funkciis kiel defendejo de la urbo. Ĝi nur havis turon ĉirkaŭita de ringmuro.Dum jarcentoj tiu kastelo ankaŭ funkciis kiel restadejo de danaj reĝoj,sed tiam oni ne pensis pri metoda plano de la urba konstruo kaj tial la domoj tute hazarde situis apud la kastelo.Tamen dum sekvaj jaroj ili estis forigitaj por doni lokon al novaj kasteloj.

Jam en la antikva tempo estis malgranda haveno ĉe Kopenhago kaj verŝajne ankaŭ komerca trafiko el ĝi.Samjare kiel la kastelkonstruo okazis plibonigo de la haveno.Absalon konstruigis pontojn inter Amagero kaj Selando,kaj en la haveno la kajoj estis pligrandigitaj.

Sub nuna Christiansborg oni povas vidi la ruinojn de la antaŭa kastelo,same ankaŭ la murojn de Absalona kastelo,krom tio ankaŭ la puton de Absalon.

## Nyhavn (nova haveno)

elfosiĝis ĉ. 167o. De 1700-1770 la domojn oni iom post iom konstruis por la komercistoj, havenistoj, gastejoj k. t. p.. Sed tiutempe la domoj havis nur 2-3 etaĝojn do pro manko de sufiĉa spaco en Kopenhago plialtiĝis la konstruaĵoj, kiuj cetere estas bone ŝirmitaj, kaj la regionen stampas kolorriĉaj domoj.

Vespere oni povas aŭdi viglan muzikon kaj kanton de la multnombraj kafejoj en là tiel nomata senbrida Nyhavn, kie oni ankaŭ dancas.

La artefaritaj frontono-trianguloj plejofte ankaŭ ornamis la antaŭajn konstruaĵojn En Nyhavn la domoj direktas la flankon al la kanalo. - En Nederlando esta male, tie la konstruaĵoj havas la frontonon al la kanalo. - Ankoraŭ oni trovas trabaĵajn domojn en Nyhavn.

La poeto H. C. Andersen loĝis en Nyhavn kaj en numero 18 kaj en 20, sed dum preskaŭ 20 jaroj en numero 67 en la dua etaĝo. En numero 20 li verkis siajn unuajn fabelojn Dum siaj lastaj jaroj li loĝis en numero 18.

La ankro ĉe Kongens Nytorv (la nova placo de la reĝo) estas memorigaĵo pri la danaj maristoj, kiuj mortfalis dum la dua mondmilito.

Antaŭe Kopenhago havis botanikan ĝardenon tie, kie nun kelkaj para-numeraj konstruaĵoj situas. Restas ankoraŭ arboj de tiu tempo malantaŭ Charlottenborg (universitato por skulptura arto kaj pentra arto).

Vidindaĵoj en Nyhavn: Firm-tabuloj (ŝildoj) pri vel-, kompas- kaj flagfaristoj, ŝtonaj tabuloj sur Nyhavn-konstruaĵoj 41 kaj 65. - Sur la muro de numero 59 situas statueto: Krusto kun la globo; ĉi tiu konstruaĵo cetere nomiĝas: "la domo de la alĥemistoj".

## Kongens Nytorv (la nova placo de la reĝo).

La plej altranĝa placo de la urbo estas Kongens Nytorv, kie situas grandaj komercaj domoj t. e. tutmondaj establaĵoj kiel A. P. Møller, ŝipa aranĝejo; Granda Skandinavi Telegrafa Kompanio, la magazeno MAGASIN. Krome ni vidas la reĝan teatron, kie oni prezentas la plej bonan aktoran arton en Danlando, kaj kies baleto apertenas al la plej fama de Europo.

La franca ambasado havas sidejon en numero 4 sur Kongens Nytorv; tiu domo estas la sola konservita konstruaĵo de 1670.

Ĉi tiuj domoj - krom aliaj - cirkaŭas "Krinsen", tre malgrandan ĝardenaĵon kaj meze en tiu situas skulpturo, farita de C. L'Amoreaux: reĝo Christian V sur ĉevalo. - Ĉiujare la novbakitaj gestudentoj cirkaŭdancas KRINSEN post la ekzameno.
Antaŭ la reĝa teatro ni vidas 2 skulptaĵojn: la poetoj Oehlenschlæger kaj Holberg.
La domo de Harsdorff (Kongens Nytorv 3-5) estas la akademio por la arkitekteduko de la art-universitato.

# La biblioteka ĝardeno

Ĝi estas unu el la plej ĉarmaj lokoj en Kopenhago.Ĝin oni kreis en 1915.Sed ne ĉiam tiu ĉi loko aspektis tia.En 1603 reĝo Kristiano la IV-a malfermis ĝu. tiun ĉi lokon kiel milit-havenon,kaj ankoraŭ ni trovas allig-ringojn en la mu En 1867 oni plenigis la havenon.La menciitaj 3 jar-nombroj,faritaj en ŝtono situas supre de la ĝarden-pordegoj.

Grandaj konstruaĵoj ĉirkaŭas la bibliotekan ĝardenon:la reĝa biblioteko, la provianto-domo,la armila muzeo kaj la ŝtata arkivo,kaj tiuj ŝirmantaj kons truaĵoj konsistas parte el muroj,faritaj de masonaĵo-nun atentu! ĝis 4 metroj pro tio la bruo de la grand-urba trafiko ne povas ĝeni vin en tiu preskaŭ monaĥejo-simila ĝardeno. Ne strange,ke multaj homoj de la proksimaj kontoroj dum siaj lunĉ-paŭzoj somere sidas sur la benkoj por ĝui la sunon,la vidon de la floroj kaj de la papilioj krom espereble ankaŭ bongustan lunĉ-paketon.

En la antaŭ-korto-kun hipo-kaŝtanoj kaj tilioj-ni vidas la statuon de Peder Schumacher (aŭ Griffenfeldt),fondinto de la ŝtata administradejo.-Apude situa la nuna ŝtata arkivo.Reĝo Frederiko la III-a konstruigis tiun domon,tiam konsistantan el arsenalo en la ter-etaĝo,biblioteko en la unua etaĝo kaj arto ĉambro en la dua.

La nuna reĝa biblioteko,trans la ĝardeno,estas konstruita je la komenco de n jarcento.-En la granda antaŭ-halo,ok-angula,kopio de baptejo en Aachen,oni aranĝas diversajn ekspoziciojn.Sur muro en tiu halo oni vidas reliefon,montra tan ŝipon.La reliefo estas kopio de tiu muro en Akropolis,kiun danaj arkeolog elfosis.Temas pri Akropolis en Lindos sur la insulo Rhodos.

Ceteraj vidindaĵoj en la ĝardeno:statuo de la filozofo Sören Kierkegaard. Sur la tegmento de la proviant-konstruaĵo situas ankoraŭ lum-turo por ŝipoj en la haven-tempo.

Apud la pordego inter la biblioteko kaj la provianto-domo staras statuo de Demosthenes,kopio de figuro,starigita en Atheno en la jaro 280.-Alia vidindaĵ apud tiu statuo kaj la provianto-domo kreskas morusa-arbo de ĉ.1650.Ĝiaj bero. similas frambojn,ili estas tre suko-plenaj kaj kolorigaj-mi nur avertas!

## La Urbdomo kaj ĝia placo.

La Urbdomo-placo estas, almenaŭ laŭ trafika vidpunkto, la centro de la urbo, ĉar 22 diversaj aŭtobuslinioj trapasas ĝin . Ili iras al ĉiuj diversaj kvartaloj: Østerbro, City, la haveno kun Christianshavn kaj Amager, Vesterbro, Frederiksberg kaj Nørrebro.

Starante kun la dorso al la aŭtobusa terminalo ni vidas sur la maldekstra flanko la domon de"Politiken" kun la lum-gazeto; poste ni preterpasas "Strøget", la pied-irantan straton, kiu trairas la tielnomatan mez-aĝan urbon kun la plej aĝaj konstruaĵoj kaj mallarĝaj stratoj.

La sekva konstruaĵo, la Palace-hotelo, havas belan turon, kaj sur ĝi estas kvar mozaikoj, kiuj simbolas matenon, tagmezon, vesperon kaj nokton.

La urbdomo mem estas flankita de 2 konataj monumentoj: maldekstre la kolono kun du lurblovistoj, pri kiuj oni diras, ke ili nur blovas se ~~xxxxxxx~~ preterpasis virgulinon pli ol 18-jara. . - Ĝis nun neniuj aŭdis sonon. Dekstre, antaŭ la urbdomo, la famkonata Drako-fontano ĵetas akvo-gutojn sur la fotantaj turistoj. Ĝi estis modelita de la skulpturistoj Th. Bindesbøll kaj Joakim Skovgård en 1904 kaj 1923. - La skulpturo montras batalon inter virbovo kaj drako.

Sur la dekstra flanko de la urbdomo, laŭlonge de H. C. Andersens Boulevard, estas malgranda ĝardeno kun skulpturo de H. C. Andersen.

Vid al vide la urbdomo, ĉe la aŭtobusterminale, staras alia skulpturo, la malgranda kornoblovisto, kiel memoraĵo de la milito 1848/50 kontraŭ la germanoj.
Se vi deziras sciigon pri la urba historio, vizitu la urbdomon, kiu laŭ tiu vidpunkto estas treege interesa; samtempe la turo estas vizitebla, kaj el ĝi la panoramo estas ege impona.

## La astronomia horloĝo

La kreinto estis naskita la 27-an de julio en la jaro 1872 en la jutlanda urbo Ribe. Kvankam lia infana hejmo estis modesta restis tie bona kaj gaja atmosfero.Oni ŝatis laŭtlegi dum oni faris alian laboron kaj vespere oni fin la tagon per kantoj kaj ludoj.
Jens Olsen frekventis burĝan lernejon. Dum siaj lernejjaroj li montris speci lajn talentojn por matematiko,fiziko kaj aritmetiko.
Jam de siaj infanjaroj li pensis iĝi horloĝisto,sed lia patro trovis alian okupon por li ĉe fajna meĥanisto.Dum sia metia lerntempo ĉe li,Jens Olsen le ĉion pri meĥanismo de horloĝoj kaj iom post iom ankaŭ legis pri astronomio. Jens iĝis bona meĥanisto.

En la jaro 1897, post la akiro sia metiista atesto,li kiel "vaganta metiis la tiel nomata "Naver" vojaĝis eksterlanden.
Li laboris i.a. en Germanio en la urbo Strassburg,kie li profunde studis la astronomian horloĝon en la katedralo.Li rakontis al siaj amikoj,ke la per sita tempo de vizito en la katedralo ne estis sufiĉa por li.Tial li kaŝis si en iu angulo kaj atendis ĝis kiam la aliaj vizitantoj estis for,kaj ĉio esti trankvila.Poste li profunde studis ĉiujn detalojn de la horloĝo.
Li ne intencis kopii ĝin sed nur konstati,ke lia astronoma horloĝo almenaŭ ne estu tia.
En Svislando li ŝanĝis metion kaj nun laboris kiel horloĝisto.Ne nur en la universitato,sed ankaŭ en la biblioteko li estis taga gasto.Multe li studis. Tamen povus ankaŭ okazi,ke li partoprenis en la kunvenoj kune kun siaj amiko kaj tiam li estis la plej gaja el ĉiuj.Post liaj laborjaroj en Svislando li vojaĝis al Parizo kaj tie laboris dum 1 kaj 1/2 jaroj i.a. dum la monda ekspozicio en la jaro 1900.

Li finis sian ĉirkaŭvojaĝon per kelk monata restado en Londono.
Lia restado eksterlande daŭris 5 jarojn.

Li venis al Kopenhago kaj tie li edziĝis al Anna Sofie Kröldrup.La geedza paro loĝis en Hallingsgade 8.La domo estis posedaĵo de lia edzino.En la domo li starigis sian propran entreprenon,sed li tamen laboris ĉe Cornelius Knudse kiel ĉefo.

Dum jaroj apud sia taga laboro li profundigis sin en elkalkulaĵoj de sia infana revo:la astronomia horloĝo.Preskaŭ 50 jaroj pasis de lia vivo,sed fine la prikalkulaĵoj estis pretaj.Li montris la planojn al la astronomo,profesoro Elis Strömgren,kiu aprobis ĉion.Por efektivigi la planojn,oni ankaŭ devas hav monon kaj tial oni kreis fondumon,kies celo estis havigi tiun.

Multaj elstaraj personoj elektigis kiel estraranoj de la fondumo,precipe tiu kiuj havis altan influon diversloke.
Malgraŭ tio pasis ankoraŭ 20 jarojn antaŭ ol la fondumo atingis la deciditan sumon.Por la konstruado de la horloĝo oni kalkulis pri 125 mil kronoj.

daŭrigo:

La fondumo turnis sin al institucioj kaj aliaj fondumoj pri ekonomia helpo. Ekzemple al Societo de metiistoj kaj Rask-Örsted fondumo.Pro la kolektita mon Jens Olsen kun la helpanto,inĝeniero Axel Flint faris la lastajn detalajn lab desegnaĵojn.

La 8-an de decembro 1943 Jens rakontis en la Societo de Metiistoj pri siaj horloĝaj planoj.De La Metiistaj Societoj en Kopenhago kaj de la provinco kaj de La Dana Societo de Fabrikantoj venis grandaj mondonacoj.

En la jaro 1944 oni faris kontrakton inter Jens Olsen kaj la fondumo. Nun povis la preskaŭ 70 jara Jens komenci la konstruon de sia horloĝo. Bedaŭrinde li ne vidis sian verkon fine konstruita.Li mortis la 17-an de nov. 1945. Lia plej proksima kunhelpanto Otto Mortensen daŭrigis la laboron. Li estis la sola,kiu okupis sin tuttempe pri la horloĝa konstruado.

Kostrui horloĝon estas multekosta afero,kaj tial la sumo de 125 mil kronoj ne estis sufiĉa.Ĉe la fina konstruo 1955 la horloĝa komiteo elspezis 700 mil k En la jaro 1944 la fondumo decidis,ke estas necese trovi kopetentajn personoj por prizorgi la plej belan enkadrigon de la horloĝo.
Komisiono iniciatis oficialan konkuradon.Dana arkitekto Gunnar Bilmann Peterse helpe de skulptisto Mogens Böggild gajnis la konkuron.

La astronomia horloĝo montras ne nur ordinaran tempon sed ankaŭ diversajn tempojn de astronomia intereso.La horloĝo montras mezeuropan tempon,mezsuntemp la veran suntempon kaj tempojn de sunleviĝo kaj sunsubiro.
Plie estas kalendaro kiu montras la diversajn lunfazojn kaj la orbitan iron de la grandaj astroj.Ĝi ankaŭ montras jaron,monaton,tagon kaj daton.
La horloĝo staras sur soklo de granito en vitrino.La skeleto de la vitrino estas farita el senrusta ŝtalo.En la soklo troviĝas kanaloj por risortŝnuroj kaj lokoj por ĝiaj peziloj.Plie troviĝas ankaŭ kanaloj por enblovi varman aeron.Per tio okazas superpremo en la vitrino kaj tiu malebligas,ke la polvo enpenetras difektante la genian meĥanismon. La 13-an de decembro 1955 reĝo Frederiko la IX-a ekfunkciigis la horloĝon.

La urbodomo estas vizitebla tage je la 10.00
Sabate la horloĝo je la 10.00 ĝis 13.00.

# Tivoli

Kopenhaga amuza ĝardeno estas famekonata de multaj turistoj en la mondo,ĉar al Tivoli venas jare 5 milionoj da homoj por ĝui la diversajn amuzaĵojn dum kelke da horoj.La kreinto de Tivoli estis dana ĵurnalisto Georg Carstensen. Li estis aktiva kaj gaja homo.Liaj multaj eksterlandaj vojaĝoj impresis lin kaj post iu vojaĝo li konstruigis la parkon Tivoli laŭ angla kaj franca model En la jaro 1843 okazis la inaŭguro.Tivoli estas lokigita sur la resto de la malnova remparo,kiu iam ŝirmis la malnovan Kopenhagon kontraŭ malamikoj.
Se vi estas floramanto vi vizitas Tivoli dum tage por admiri la abundan flor-amason.Ĉiujare 160 mil da floroj ornamas la ĝardenon.Tre rimarkinde estas ank promenado en la ĝardeno vespere por vidi la 100 mil multkolorajn lampojn,kiuj disĵetas agrablan kaj belan lumon ĉie. Ni ankaŭ ne forgesu admiri la belan fontanon antaŭ la kocertsalonego.Multkolorajn akvofadenojn ĝi alten ŝprucas.
La malnova koncertsalonego estis maŭrestila konstruita en la jaro 1901-1902. Ĝi estis tre unika,ĉar ĝia tegmento estis kovrita per centoj da multkoloraj gaslampoj.Bedaŭrinde ĝi estis detruita 1944 helpe de danaj partianoj de Hitle -Nun en la jaro 1956 la nova koncertsalonego estis inaŭgurita.Dufoje vespere okazas muzikprezentado en ĝi.Multfoje la koncerto estas senpaga,sed ofte vena eksterlandaj famekonataj muzikistoj kaj kantistoj al Kopenhago por prezenti ŝatatajn programojn.Al tiuj koncertoj oni devas antaŭaĉeti biletojn ĉe la biletvendejo proksime al la ĉefa enirejo.

Trovigas ankaŭ "Vitradomo"(Glassalen),ĝi estas konstruita 1863.
Tiu domo estis plurfoje rekonstruita.Iam oni prezentis teatraĵojn tie,sed nun tempe oni prezentas varieteajn programojn.
Tre alloga loko en Tivoli estas la Pantomime teatro.Ĝi estas konstruita 1874. La antaŭkurteno estas vosto de la pavo kaj supre sur la kadro de la scenejo oni metis frazon:per ĉinaj silaboj:"Kun la popolo,komuna plezuro".

Ĉiuvespere dum la somero okazas prezentado de Comedia dell Arte,(itala metiis comedio).Kun granda ĝojo oni vidas artistojn Arlekin kun sia Columbine kaj Kassander kaj lian serviston Pjerrot.
Je la 21.45 okazas amuza baleto,Proksime al la koncertsalonego situas subĉie prezentejo (Plänen),kie ekvilibristoj prezentas siajn akrobatajn saltojn por distri la publikon.Proksime 20 restoracioj atendas turistojn por servi bongus ajn specialaĵojn.Ĉe kelkaj la manĝaĵo multekostas,sed se oni flankeniras el 1 mallarĝaj stratetoj oni povas manĝi je moderaj prezoj.
Fine oni povas promeni ĉirkaŭ la lago de Tivoli.La tuta lago estas randgarni per bluaj kaj ruĝaj elektraj lampoj,kiuj donas duoblan efikon pro rebrilo en la laga akvo.Oni ankaŭ multe admiras la ĉinan turon,kiu sin respegulas mult-kolore en la akvo surface.Merk.sab.dim.okazas artfajraĵo.

La Urbdomo de Kopenhago.

La nunan urbdomon en Kopenhago oni konstruis en 19o5 laŭ desegnaĵoj de arkitekto Martin Nyrop en itala renesanco stilo. Tri el la kvar antaŭaj urbdomoj, kiuj forbrulis, situis sur la placo "Gammeltorv", kie la nuna juĝejo troviĝas.

Super la ĉefpordo estas vitro mozaiko kun la urbo-blazona insigno, kaj super ĝi staras, kiel ora reliefo en la muro, la fondinto de la urbo: la episkopo Absalon. En la maldekstra angulo sin levas la turo 1o5 m ĝis la pinto.

La tuta urbdomo estas granda kvar-angulo, kiu estas dividita en du partoj per mez-konstruaĵo. La plej antaŭa parto havas grandan halon kun balkono, kolonado kaj vitro-tegmento. Super ĉiuj pordoj kaj kolonoj estas belaj ornamentoj, kaj sub la kolonado estas skribitaj la plej gravaj okazaĵoj en la urba historio.

El ĉi tiu kolonado oni venos al la plej gravaj salonoj de la urbdomo: La festsalono, biblioteko, ĉambroj de la urbestroj kaj salono por la urbaj delegitoj.

Ĉiuloke, sur kolonadoj, ŝtuparoj, salonoj, ĉambroj k.t.p., muroj kaj tegmentoj estas treege bele dekoritaj per freskoj , faritaj precipe de Joakim Skovgaard kaj Martin Nyrop. Ili uzis motivojn de la urba vivo kaj de la pejzaĝo en la cirkaŭaĵo (homoj, bestoj, floroj ktp.), kaj meze de tio pendas kaj staras skulpturoj kaj pentrajoj de famaj urbanoj kune kun altvaloraj donacoj el fremdaj landoj.

La plej belaj dekoritaj salonoj estas la edziĝo-salonoj, kiuj bedaŭrinde ne estas viziteblaj, almenaŭ ne dumtage, ĉar ile estas ĉiam okupataj. Sed vespere vizito de grupoj povas esti aranĝita.
La dekoraĵoj nur konsistas el gobelenoj kaj freskoj en belaj koloroj. Ili rakontas la historiojn el du popolkantoj.

La malantaŭa parto de la urbdomo enhavas precipe oficejojn en tri flankaĵoj kun ĝardena korto, kie staras urso-fontano, ankaŭ farita de Bindesbøll kaj J. Skovgaard.

Rondirado kun gvidanto ĉiutage: 11.- ĝis 15.
Enirprezo: 1,oo kr.

Amalienborg

Pro la brulo de Christiansborg en 1794 la reĝa familio perdis sian loĝejon. Ĉar Kristian la VI-a ankaŭ posedis la palacon de Schack,kaj ĉar la palaco de Moltke estis por vendo,ŝajnis tre nature elekti Amalienborg kiel kopenhaga reĝo-restadejo,kaj de tiu tempo Amalienborg,konsista el kvar palacoj ĉirkaŭ ok-angula placo,restis tia.

Dum 1669-1675 la reĝino de Frederik la III-a,nomata Sophie Amalie,konstruigi plezurkastelon:Amalienborg,kiu brulis en 1689,kaj la regiono restis senuzita ĝis la oldenburga reĝa familio decidis pro sia 300-jara jubileo krei novan kvartalon.

Kvar terpecojn ricevis 4 el tiam plej gravaj viroj,kiuj rekompense devigis sin laŭ la planoj de la arkitekto Eigtved konstrui siajn palacojn.
La gvida inter tiuj viroj estis sendube kortega supermarŝalo kaj sekreta konsilisto Gottlib Moltke,kies palaco(sud-okcidenta) estas konstruita en 1754 La sud-orientan palacon ricevis konsilisto Severin Lövenskjold,kiu vendis ĝin al vidva grafino Schack,kaj la palaco havas ties nomon;ĝi estas konstruita en la jaro 1759.La nord-orienta palaco,apartenanta al Joachim Brockdorff, kaj la nord-okcidenta,apartenanta al Kristian F.Levetzau,estis ekuzita en 176

Kutime la diversaj reĝaj vidvinoj loĝas en la palaco,kie loĝis dum sia reĝin tempo.La nova reĝo/reĝino ekloĝas en alia el la 4 palacoj,tiel la rezida rest dejo ŝangas lokon je ĉiu nova reĝo. _ La reĝa familio loĝas dum la plej grand parto de la jaro en Amalienborg,kies stilo estas rokoko.

La kolonaro estas farita el ligno kiel kopiaĵo de marmoraj kolonoj en la Ateno-sanktejo de Priene.

Holmens Kirke.

La preĝejo sur la insuleto havas ne-ordinaran historion. Ĉi tie situas ek de jaro 1560 ankroforĝejo, sed en la jaro 1617 fondiĝis nova eklezia distrikto nomiĝita "paroĥo de insuleto" Tiu paroĥo ampleksas ĉiujn, kiuj apartenas la militŝiparo, kaj al tiu mankas loko por diservo. La milit-ŝiparanoj devis uzi malgrandan manĝejon sanktita de episkopo kiel preĝejon.

Tio ne plaĉis al rego Chr. d. 4., kiu ĉiam deziris helpi la diokulton. Li decidis, ke la ankroforĝejo estu rekonstruita kiel preĝejo, kaj en la jaro 1619 oni solene malfermis ĝin.

La frontono apud la kanalo estas parto de la plej malnova konstruaĵo, sed kalkaĵo kaj pentrado de pli malfruaj tempoj bedaŭrinde kovras ĝin tiel, ke oni ne plu povas vidi, kiel ĝi origine aspektis. La postrestita parto de la konstruaĵo iĝis parto de la preĝejo en la jaro 1643, kaj samtempe konstruiĝis la krucbrakoj tiel, ke la preĝejo ekhavis sian nuntempan formon. La arkitekto nomiĝis Leonhard Blasius. La longa tombkapelo laŭlonge la kanalo konstruiĝis 1705 ( de arkitekto C. Ernst.) Ĉi tie oni trovas multajn belajn sarkofagojn. La du famaj marist-herooj: Niels Juel kaj Tordenskjold estas entombiĝita tie.

La malgranda konfesseĝa-domo apud Holmens bro (ponto de insuleto) estas pli nova. Ĝi konstruiĝis okaze de la renovigo en la jaro 1870. (Arkitekto L. Fenger)
Nun estas en ĝi kontoroj.

Holmens Kirke havas interne ankoraŭ iom de sia antikva karaktero. La stukoplafono kaj la sidlokoj devenas de la plivastigo de la preĝejo en la jaro 1643. La altartabulo kaj la predika pupitro estas pli nova. Ili estas faritaj en festa kartilag-baroka lignoskulptaĵo dum la jaroj 1661 - 1662 de Abel Schröder. - Sur la muroj pendas multaj belaj malnovaj tombo-surskriboj.
La tombejo fondiĝis en la jaro 1660 kaj estas la plej malnova tombejo en Kopenhago.